SE VI RESPONDIS LA TESTON VI EBLE ŜATAS KOMPARI VIAJN REZULTOJN KIUN TIUJ DE LA 238 RESPONDINTOJ, KIES REZULTOJ TROVIĜAS SUR LA PAĜOJ 15 KAJ 19. LA KONTROLO HAVAS DU PAŜOJN.

I. Via rezulto komparata kun tiu de la test-farintoj

S estas la sumo de viaj poentnombroj en la testoj C, D, E, F, G.
Prenu la grafikon de paĝo 15 kaj trovu sur la vertikala akso la ciferon S.

H indikas horojn de lernado kaj de uzado de Esperanto..
Trovu sur la horizontala akso la ciferon H.

Vi trovu en la grafikaĵo la intersekcion, do la punkton kies vertikala distanco estas S kaj la horizontala distanco estas H.

Konstatu al kiu grupo vi apartenas:

- RU: se via gepatra lingvo estas romana aŭ ĝermana kaj se vi studis en universitato,
- RM: se via gepatra lingvo estas romana aŭ ĝermana kaj se vi ne studis en universitato
- SU: se via gepatra lingvo ne estas romana aŭ ĝermana kaj se vi studis en universitato,
- SM: se via gepatra lingvo ne estas romana aŭ ĝermana kaj se vi ne studis en universitato

Se la intersekcio en la grafikaĵo troviĝas sur la linio de via grupo, la testo konfirmas la rilaton inter S kaj H, kiu devus ekzisti laŭ la testo. Ju pli granda estas la distanco inter la intersekcio kaj la linio de via grupo, des malpli trafe funkcias nia testo.

II. Via rezulto komparata helpe de la uzo de la memtaksilo

Ni ripetas la saman proceduron, uzante la memtaksilon anstataŭ la testrezulton.
La memtaksilo donas juĝon pri via lingvo-uzado. Ĉiu el ĝiaj 42 asertoj povas esti vera aŭ malvera. La sumon de la veraj asertoj ni nomas S.
Prenu la grafikaĵon de **paĝo 19** kaj trovu sur la vertikala akso la ciferon S.

La horojn de lernado kaj de uzado de Esperanto ni nomas H.
Trovu sur la horizontala akso la ciferon H.

Trovu en la grafikaĵo la intersekcion, do la punkton kies vertikala distanco estas S kaj la horizontala distanco estas H.

Se la intersekcio en la grafikaĵo troviĝas sur la linio de via grupo RU, RM, SU, aŭ SM, la testo konfirmas la rilaton inter S kaj H kiu devus ekzisti laŭ la memtaksilo. Ju pli granda estas la distanco inter la intersekcio kaj la linio de via grupo, des malpli trafe funkcias nia memtaksilo.

Nia peto al vi

Se vi partoprenis aŭ partoprenos la teston kaj/aŭ la taksadon per la memtaksilo, ni ŝatus rievi de vi

1. pri la testo: la ciferojn S kaj H,
2. pri la memtaksado: la ciferojn S kaj H
3. kaj vian grupon: RU, RM, SU au SM.

Bv. sendi viajn datumojn al la adreso: testrezultoj@edukado.net
Ni uzas ilin nur por statistikaj celoj kaj garantias al vi diskretecon kaj anonimecon.

Dankas vin: Hans Bakker kaj katalin Kovats